

TEA-BULTENO

19^A JARO - N° 132

JULIO - AŬGUSTO

N. 7-8/2016

Gejunuloj ne bezonas predikojn, ili bezonas nur ekzemplojn pri honesteco, kohereco kaj malegoismo.
Alessandro Pertini (politikisto, ĵurnalisto, eksa Itala Prezidanto - 1896-1990)

Karaj Gelegantoj!

Kiam estis inaŭgurita la ekspozicio pri *Filatelo kaj Esperanto* en la Muzeo Poŝta kaj Telegrafa de Mezeŭropo en Triesto, brile sunis: ŝajnis aŭguro de granda sukceso! Kaj fakte, tiel estis! En la saloneto de la Muzeo ariĝis ĉirkaŭ kvindeko da personoj, esperantistaj kaj ne, kiu atente aŭskultis la enkondukajn paroladetojn kiujn sekvis la vizito. Malfermis la inaŭguron la muzea direktorino d-ro Chiara Simon, kun kiu estis starigitaj kunlaboraj kaj amikaj rilatoj jam fine de la pasinta jaro, kiam oni estis proponinta al ŝi la okazigon de ĉi ekspozicio. En sia mallonga prezento ŝi esprimis sian miron pro la granda kvanto da materialo filatela rilata al Esperanto kaj ankaŭ kiom da scioj ŝi ricevis pri la lingvo mem dum la komuna preparado kaj muntado de la 15 paneloj. Chiara Simon substrekis interalie la fakton, ke unuafoje en sia muzea kariero ŝi prezentis al publiko eksponaĵojn de filatelistino: strangas, sed tio veras, ĉar pli ofte estas viroj kiuj ŝatokupiĝas pri filatelo (*n.d.r. - mi ne scias tamen, kion diras la statistikoj pri kvanto da viroj kaj virinoj en filatela kampo!*). Post ŝi parolis la TEA-prezidanto, Edvige Tantin, kiu atentigis pri la interesa ligilo inter la triestaj Poŝta Institucio kaj Esperanto-Asocio, ĉar la fondinto kaj unua prezidanto de TEA estis d-ro Arturo Ghez, deĵorinto kiel poŝta oficiro dum la Aŭstro-Hungara Imperio. Salute vortumis s-ro Boris Di Costanzo, veninta el Rijeka kun grupeto da esperantistoj kaj fine, kun dankaj esprimoj pro la ebleco donita prezenti Esperanton en tiel prestiĝaj lokaloj, Elda Doerfler klarige gvidis la viziton de la eksponaĵoj.

Okaze de la evento estis eldonitaj porokazaj kovertoj kaj bildkartoj, kaj speciala stampo, kiuj estas aĉetebaj ĉe la muzeo mem aŭ ĉe TEA-sidejo.



Krome dum kelkaj ĵaŭdoj, je la 17^a horo, okazos en la halo de la Muzeo prelegoj E-temaj aŭ prezento de libroj. La 7^{an} de julio venos al Triesto Martin Stuppig, kiu parolos pri sia libro *Kriegsimpressionen*, tradukita al Esperanto, *Home en senhomeco*, pritraktanta liajn travivaĵojn dum la 2^a mondmilito. Sur la tagĵurnalo *Il Piccolo* aperos la anoncoj pri la sekvontaj okazaĵoj.

La ekspozicio estas vizitebla ĝis la 27^a de aŭgusto, ĉiutage escepte de dimanĉo kaj festotagoj, de la 9^a ĝis la 12.30 horoj. Nu, ne maltrafu ĉi okazon: vi certe estos kontentaj! Bondezirante al vi ĉiuj plej bonajn somerferiojn, entuziasmigajn kongrespartoprenojn, intensan esperantumadon en Esperantujo, plej kore vin salutas,

Via redaktanto

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos
**vendredon la 9^{an} de septembro
je la 19^a h.**

Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!



Kiel kutime, okazos en julio aŭ aŭgusto la
SOMERA FESTO ĉe ANITA.

Ankoraŭ ne fiksita estas la dato, tial, kiel eble plej frue, ni informos vin, rete aŭ telefone!

Kio novas en Triesto?

Antaŭ kelkaj jaroj, vagante tra la urbo por *eternigi* per la fotilo ion interesan, trafis mi straton de la Artistoj (*via degli Artisti*), kie situas la eksa Teatro *Filodrammatico*, funkciinta, sed nur kiel kinejo, prok-simume ĝis antaŭ 30 jaroj. La konstruaĵo nun estas duonruinigita - kvankam troviĝanta urbocentre! -, sed ankoraŭ reprezentas vere gravan pecon de la triesta historio. Forlasita neutiligata dum tiom da jaroj, kompreneble muroj, tegmento disfalis, kaj eĉ du fojojn ĝi suferis incendion, t.e. en 2006 kaj 2008. Timante ke baldaŭ ĝi malaperos sub la batadoj de frakasmaŝinoj, tuj mi fotis tion kio ankoraŭ originala kaj ne disfalanta aŭ kovrita per protektiloj restis sur la doma muro: la ŝildo sur kiu aperas la nomo de la teatro.

La Teatro estis konstruita inter 1828 kaj 1829 laŭ projekto de arkitekto Giuseppe Fontana, komisiita de la riĉa hebrea komercisto Isacco Guetta, kiu estis la proprietulo ekde 1826 de la tereno, kiu antaŭe estis okupata de aro da forbrulintaj domoj. La inaŭguro okazis en la vespero de la 22^a de junio 1829. La komenca plano antaŭvidis nur dancosalonon, sed poste la fina celo estis ĝia servado kiel teatro. La interna strukturo [*vidu ĉi suben*] estis dividita en plurajn ordojn de loĝioj, enestis galerio kaj parteroj, ĉi lasta partigita en du sektorojn kun po dek ses vicoj. La ĉefa salono estis dekorita de Giuseppe Gatteri¹ per infanetoj, festonoj, floroj, simboloj de Arto kaj grupo kun Apolono flankita de la Muzoj, pentrita sur la scenkurteno.



En 1829, la konstruaĵo estis prenita adjudike de Israel Jacha kiu celis ĝin destini por marionetaj spektakloj. En februaro la teatro estis luprenita de la Societo Drama-Filharmonia sub direkto de Francesco Hermet².

Dufoje la teatra komplekso estis restaŭrita kaj modifita, unue en 1853 kaj poste en 1879. Finfine, en la tiujara septembro, estis inaŭgurita la nova teatro. En 1876, la 17-jarulino Eleonora Duse³ estis dungita por teatra prezentaĵo, sed la triesta publiko ne tro favore akceptis ŝin: ŝi rikoltis ne aplaŭdojn sed ... solenan fiaskon! Kiam ŝia ĉiekonateco kaj famo atingis gloran pinton, E. Duse revenis al Triesto engaĝita por la tuta proza sezono, sed - ho, ve! - daŭre ŝi estis kontestata de la spektantaro pro siaj recitado kaj ekstermezuraj miel dolĉaj pozoj.



Estante inteligenta kaj memkritikema, la artistino korektis tiujn superflujajn kondutmanierojn kaj plie multe progresis en sia aktorado, tiom ke post du jaroj, dum denova prezentiĝo antaŭ la triesta publiko, preskaŭ ekplodis la tuta teatro pro la nebremsebla entuziasmo de la spektantaro.

La teatro, en 1906, transformiĝas en *Kinejon ĉe Korso*: unu el la unuaj kinprezentaĵoj de la tuta urbo estis farita ĝuste tie ĉi la 16^{an} de majo. Plenplenis la salono je personoj, kiu spektis dokumentfilmon kaj komikajn skeĉojn.

Post unu jaro la sama salono, kun sensacia sukceso, gastigis la faman komponiston Franz Léhár, kiu surpodiis por direkti sian famegan opereton "La gaja Vidvino"-n. En 1908 ree la teatro iĝas kinsalono. La unua filmo projekciita estas "Vivo kaj pasio de Kristo"⁴. En 1927 en ĝi gastas eĉ la unua elekto-konkurso de *Fraŭlino Triesto* (Miss Trieste).



Intertempe jam estis komenciĝinta la *erao* de Angelo Cecchelin, la plej elstara el la triestaj komikistoj. En la 1920^{aj} jaroj li fondas trupon, kies nomo estis *La ganga de le macie* [el la triesta dialekto: La bando el burleskuloj], pli poste alinomita "La Triestissima", kun kiu li kunludas ĝis la 1939^a jaro. A. Cecchelin aktor-as precipe en la teatroj *Filodrammatico* kaj *Regina* (Reĝino), sed turneadas ankaŭ en la Juli-Venecia kaj Istria regionoj, ĝis fine, en 1945, li realigas ampleksan trairadon de Italio per la bonega spektaklo "Triesto mia". Tiu ĉi elstara dialekta komikulo mortis en 1964. Al li, antaŭ unu jaro, estis dediĉita strato en la apudeco de la Teatro Filodrammatico.

Ha, preskaŭ mi forgesis aldoni, ke la iama prestiĝa palaco, en siaj lastaj vivojaroj, ricevis la honoron, ke en ĝia granda salono instal-

iĝu ... "filmejo je ruĝaj lumoj" - elegante dirite, aŭ - pli simple, "porno-spektejo". Kiel atestaĵo, lastatempe estis trovita inter la morter-ruboj, rara "antikvaĵo", nome bildkarto kun la jena slogano en la angla, itala, kroata, slovena lingvoj: "La unua ruĝluma kinejo en la tuta Italio"!

Sed la historio de tiu konstruaĵo ne finiĝas tiele: la tuto estis antaŭ nelonge aĉetita de iu institucio, kiu el la ruinoj de tiu glora teatro eligos rezid-palaco, enhavantan entute 19 loĝejojn, 3 varvendejojn kaj parkejon por entute 89 aŭtomobiloj. La entrepreno garantiis, ke, ekde nun ĝis la liverado de la apartamentoj al aĉetintoj, pasos nur dek ok monatoj.

Ni vidos, ni vidos!

Notoj:

1. Giuseppe Gatteri (1799-1878), dekoraciisto, patro de la pli fama kaj talenta Giuseppe Lorenzo (1829-1884), triesta grafikisto kaj pentristo.
2. Francesco Hermet naskiĝis en Vieno, 1811. Lia familio estis armen-devena, ekloĝinta en Triesto je la dua duono de la 18^a jc. Tre eklektika kaj talentoplena personeco, li lernis ĉe la Komerca kaj Naŭtika Akademio, sed lia vera pasio estis la teatro. Mecenato, politikisto, ĵurnalisto, dum sia tuta vivo li laboris favore al Triesto kaj ties ĉi civitanoj.
3. Eleonora Duse (1858-1924) jam kiel 4-jarulino surtretis la scenejon kaj ekde tiam ŝia kariero alten leviĝis, danke al entuziasmo kaj de publiko kaj de kritikistoj. Ŝi alfrontis per siaj prezentaĵoj tre gravajn kaj dornajn temojn de tiepoka, hipokrita, burĝa klaso: monon, sekson, familion, geedziĝon, eĉ la virinan rolon.
4. *La vie et la passion de Jésus-Christ* - Franca filmo direktita de Ferdinand Zecca kaj Lucien Nonguet en 1903. La filmo daŭris 44 minutojn kaj estis konsiderita aŭtentika epokfara produktaĵo. Spektindas la plej gravaj vivomomentoj de Jesuo, de la infanaĝo ĝis lia morto kaj resurekto.

... kaj kio novas en la mondo?

Ovoŝeloj: la plej bona ekzistanta materialo por pakumado.

Ofte legeblas, en ĵurnaloj kaj revuoj, informoj pri novaj malkovroj, sciencemaj esploroj por plibonigoj de tiuj materialoj ĝis nun uzataj kaj poste rezultintaj danĝeraj por la naturo kaj homaro, medicinaj studoj pri nekonataj malsanoj ks. Ĉiam tiuj artikoloj legindas, eĉ se ne ankoraŭ finita estas la eksperimentado.

Lastatempe mi legis tre interesan priskribon pri utiligo de ovaj ŝeloj por produktado de ia bioplasto, tre fleksebla kaj rezista, uzbla por enpakado, kvankam tiu miksaĵo, en kiun oni aldonas la ovon, antaŭvidas same la enmeton de petrola polimero, sed en ege malpli granda kvanto.



Antaŭ ol daŭrigi, mi deziris informiĝi, pri kio entute estas tiu polimero.

Polimeroj estas granddimensiaj molekuloj, konsistantaj el ripetado de la unuopaj elementoj, monomeroj. Ĉiuj grandaj molekuloj, karakterizantaj la evoluon de la vivo, nome proteinoj, nukle-acidoj kaj glucidoj, estas polimeroj. De la pasinta jarcento aldoniĝis al tiuj naturaj polimeroj la sintezaj, elfaritaj de la homo kaj preskaŭ ĉiam derivataj de la petrolo.

La naturaj polimeroj estas proteinoj, ameloj kaj celulozo. Proteinoj devenas el sinsekvo da aminoacidoj, dum ameloj kaj celulozo el sinsekvo da glucidoj.

En la 20^a jarcento ampleksege evoluis la petrola kemio, tiel sekve la sintezaj polimeroj. Plastaĵoj, gumaĵoj (ne tiuj eliritaj el latekso sekreciita de la giganta brazila arbo), fibroj, gluaĵoj, rezinoj konkeris dominan rolon en la monda ekonomio kaj en ĉiuj ĉi la ĉefa elemento estas la sinteza polimero.

La sintezaj polimeroj havas malpli kompleksan strukturon ol tiuj biologiaj, kaj ne degradiĝas per la interveno de bakterioj, tial ili restadas en la medio dum centoj kaj centoj da jaroj, kontribuante tiel ekstermezure al monda poluado.

Sed ni revenu al la eltrovo de esplorista skipo el la *Tuskegee University* (Alabamo) prezentita dum antaŭnelonga jarkunveno de la Usona Kemia Societo. Por plibonigi la komponaĵon, oni ekpensis aldoni fragmentojn el ovoŝeloj, tial la grupo kreis nano-korpusklojn el la ovoŝeloj per ultrasonaj ondoj. Etaj ovoŝeleroj estis lavitaj, muelitaj kune kun *glicene propilenico* kaj poste submetitaj al prilabora procedo. Danke al tiu ĉi prilaborado la diserigitaj elementoj transformiĝis en etajn partiklojn kiuj, aldonitaj al la polimeroj utiligataj por la enpakado, donis interesajn karakterizojn, ĉar evidentiĝis, ke la nova materialo havas la eksterordinaran econ fleksiĝi sen rompiĝi (700% pli da fleksebleco ol la tradiciaj bioplastaĵoj).

La plej grava afero tamen estas, ke ĉi komponaĵo bio-malkombiniĝas jam tri monatojn post ĝia enterigo.

Nu, la ĉefa kuriozaĵo de tiu ĉi rezultinta materialo enhavanta ovoŝelojn estas, ke ĝi aparte oportunas por la farado de la ujoj, en kiuj la ovoĵ estas vendataj!

Tie kaj tie pluketante...

NOVA REDAKTORO POR LA REVUO ESPERANTO

El ses kandidatoj por sekvi Fabrício Valle kiel redaktoro de la revuo *Esperanto*, la Estraro de UEA elektis s-ron Attila Kaszás. Li estas diplomita esperantologo, historiisto, politologo kaj laboras en Budapeŝto kiel konsultanto kaj maŝinisto.

Ni estas tre feliĉaj pri la kvalito de la homoj, kiuj proponis sin por tiu grava rolo, komentas la UEA-Prezidanto, d-ro Mark Fettes. *Denove nia komunumo montris, kiom da talentoj ĝi daŭre sukcesas nutri. La redaktoro estas ŝlosila ano de nia teamo en la Estraro kaj Oficejo, kaj mi antaŭvidas, ke Attila plurflanke kontribuos al niaj laboroj por la renovigo de la Asocio.*

Lerninto ĉe la fama kvintaga *Piratfiŝkurso* en 1987, Kaszás tuj aliĝis al la E-Fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto, kaj fariĝis tre aktiva en la junulara movado de la 1990^{aj} jaroj. Estrarano de Hungara E-Junularo kaj TEJO, li kunorganizis multajn junularajn renkontiĝojn kaj trejnseminariojn, rolante kiel la LKK-prezidanto de la 55^a IJK. Dum la renkontiĝoj li ofte verkis kaj reĝisoris humurajn skeĉojn kaj kunredaktis eldonaĵojn. Poste li fondis Esperanto-familion, en kiu naskiĝis unu filo.

Profesie, A. Kaszás laboris ĉe registaraj instancoj, NRO-oj kaj komercaj entreprenoj en diversaj kampoj, kiel ekz. junularpolitiko, ekologia mastrumado kaj internaciaj rilatoj. Li nun faras doktorajn studojn pri elektronika demokratio. Membro de la hungara UNICEF-komisiono kaj estrarano de la Asocio de Eŭropaj Baloto-Spertuloj, li krome ellernis pro pasio dek kvar lingvojn ĝis nun, kaj multe vojaĝis, entute en pli ol kvardek landoj.

Kaszás transprenis la redaktadon de la revuo kun granda entuziasmo, kaj multegas en lia kapo planoj por realigi kiel eble plej riĉenhavan kaj interesan revuon.

Gratulojn pro la elekto kaj bondezirojn de sukcesa laborado! El Gazetaraj UEA-Komunikoj

Dimanĉon la 11^{an} de septembro 2016 Festo de Amikeco sur Monto Forno



Sur la Trilanda Pinto, *Dreiländereck*, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistaj grupoj de Aŭstrio, Slovenio kaj Italio.

Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso. Rendezuo ĉe la surpinta-simbolo ekde la 12^a horo. Tie bonvenigos nin ĉiujn Martin Stuppniĝ!

Blogo pri la planedo Marso kun la fotoj de HIRISE

<http://beautifulmars-esperanto.tumblr.com/>
vizitu tiun ĉi blogon pri NASA-projekto en Esperanto, kunhaviganta fotojn pri la planedo Marso!

Enkadre de la projekto HIRISE (*Scienca Eksperimento pri Fotado kun Alta Distingivo*) funkcias la plej forta foto-kamerao de sia speco sendita al alia planedo, montranta al ni bildojn de la surfaco de Marso kun nekredibla distingivo. Ĉi tiu blogo en Tumblr estas la unua scienca retfluo de NASA-projekto en Esperanto, kunhaviganta Marson kun aliaj, kaj prizorgata de Shane Kirby, tradukista volontulo ĉe la usona kosma instituto.

Kiu volas partopreni en la Projekto *Bela Marso*, povas kontakti: Shane Kirby, beautifulmars@uahirise.org


Heroldo estas aĉetita!

Heroldo de Esperanto, unu el la plej malnovaj Esperanto-gazetoj, reaperos en 2017. Ĝin revivigos Fabrício Valle kaj Paulo Lima, partneroj en la entrepreno *Sociale Grupo Lexus* en Brazilo. Informoj pri la planoj de Lexus rilate la gazeton, fonditan de Teo Jung, aperos ĉe

<https://www.facebook.com/lesussociale/>

Fonto: Ret-Info, LS

Esperanto ĉe Alirprogramoj de RadioUno je la h. 14.50



Ne forgesu ŝalti la radion por aŭskulti la dissendon de

**Vendredo la 8^a de julio:
110 JAROJ DE ESPERANTO
EN TRIESTO.**

Bonan aŭskultadon!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Eida DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 17-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 345 2490291 - 040 350093; 339 2226936

Banka Konto: Unicredit—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it

Asociaj tt-etoj: www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org